

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 11

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

NOVEMBRO 1932

## Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

### Gramatikaj demandoj.

#### 39. Adverbo.

„Estas bone, ke li venos.“ — „Estas bona lia veno.“ Kial oni ĉiam uzas la adverbajn formojn por la predikato, kiam la subjekto hazarde estas subfrazo?

(F. J. B.)

#### 40. Dativo.

Mi legis en Heroldo n-ro 14 (667), pĝ. 6, la frazon: „... estas ŝtonoj, kiujn oni povas alligi sin al la kolo.“ Ĉu korekta?

(F. R.)

#### 41. Refleksivo.

S-ro F. J. B. metas antaŭ nin diversajn frazojn, kiujn ni devus ripeti en nia respondo — tial oni tuj trovu ilin tie.

#### 42. Kazo.

Kiun formon vi preferas aŭ rekomendas kiel pli Zamenhofan: 1. „Oni elektis lin prezidanto“ aŭ 2. „Oni elektis li prezidanton“? En Jesaja 60/17, ĉu estis Zamenhof kiu, traduke, skribis: „Mi faros via estraro la pacon kaj viaj administrantoj la justecon“?

G. W. L.

#### 43. -iĝ-.

Ordinare oni „fum(ad)as cigarojn kaj pipojn“; sed en „Remarque: La vojo returne“ mi legis, ke „cigaroj kaj pipoj fumadas“ — ĉu ne devas esti „fumiĝadas“? A. J.

### Respondoj.

#### 13. Komparativo sen komparo.

S-ano P. B. skribas ke ankaŭ en hungara lingvo oni povas uzi komparativon sen komparo, kvankam cetere la hungara lingvo estas tre malsimila al la germana, ekz.: „Neniu pli grava gazeto preparolis ĝin.“ — Certe, la uzado de l' komparativo sen komparo ne estas grava eraro, tamen ĝenerale evitinda.

#### 35. Komparativo.

La respondo al demando 35 ŝajnas al mi (matematiko kaj sekve gramatike) ne ĝusta. Mi opinias ke oni devas diri: „duoble alta“ (aŭ: dufoje tiel alta). „Duoble pli alta“ signifus: same alta plus dufoje tiel alta, do trifoje tiel alta. Oni faras ofte la saman eraron en naciaj lingvoj, almenaŭ en la nederlanda la esprimo: „2 maal hooger“ estas erara, kiam oni volas diri: „2 maal zoo hoog“.

S-ino J. H. H.

#### 39. Adverbo.

Tia demando estas malfacile respondebla. On povus same demandi, kial en frazo kiel „oni nomis lin generalo“ la vorto „generalo“ ne havas la akuzativan finaĵon. Tiajn regulojn de la gramatiko oni simple akceptas.

#### 40. Dativo.

Ne, tiu frazo estas malkorekta; la redakcio estus devinta korekti ĝin je: „... kiujn oni povus alligi al sia kolo“, aŭ: „kiujn oni povus ligi ĉirkaŭ sia kolo“.

#### 41. Refleksivo.

Ĉu jenaj frazoj estas ĝustaj?:

1. Tio pruvas, ke li vidas sian patrinon.
2. Tio igos lin vidi sian patrinon.
3. A dubas, ĉu B vidos sian patrinon (ĉu de A, ĉu de B?).
4. Li montras sin kuraĝa (montriĝas kuraĝa).
5. Li esperas sin venkonta (li esperas ke li mem estas venkonta).
6. Li esperas venkonton si (li esperas ke la venkonto estas li mem).
7. A esperas, ke B vidos sian patrinon (kies?).
8. A esperigas B-n, ke li (B) vidos sian patrinon (ĉu de B?).
9. A esperigas B-n vidi sian patrinon (kies?).

Studejo de Zamenhofs Gramatiko, Tokio:

## Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof

laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle.

(Komencon kaj unuan daŭrigon legu en L. Kr. 7 (aŭgusto) kaj 9/10 (oktobro). En n-ro 7 troviĝas ankaŭ la klarigo de la mallongigoj.)

#### 374. Tria Kongreso 1907 en Cambridge.

OV ref: R, ED, Corret-Era, LI (?).

Niaj ref: R, ED, Corret-Era, Ĉas, Möb, Brüg.

OV citas kiel referencon „Lingvo Internacia“ XIII. 1908, paĝ. 1—8. La teksto tamen ne aperas sur la paĝoj cititaj nek en ia parto de la nomita jarkolekto. Ni trovis, ke la artikoloj pri la Tria Kongreso aperis en ia Literatura Aldono: Septembro—Decembro 1907, paĝoj 129—208. Kvankam ni ne povis akiri tiujn numerojn de la Aldono, ni kredas, ke la suprenomita Raporto de Corret kaj Era estas tute sama kun la Al-

10. A rimarkas, kiel B vidas sian patrinon (kies?).

11. A esperas B-n vidonta sian patrinon (kies?).

12. Li esperas ilin vidontaj sian patrinon (kies?).

Escepte de 6, la frazoj estas ne malkorekta, sed 11 kaj 12 estas malbonaj. La refleksivo rilatas al la subjekto de tiu sama propozicio (frazo), en kiu ĝi troviĝas, egale ĉu tiu propozicio estas dependa (subfrazo) aŭ nedependa. La refleksivo rilatas en frazo 1 al li, 2 al lin, 3 al B, 4 al li, 5 al li, (en 6 si devas esti li), 7 al B, 8 al B, 9 al B (vidi = ke li vidos), 10 al B, 11 al B, 12 al lin. Anstataŭ 6 s-ano F. J. B. mem metis korektan frazon inter krampojn. Simile diru anst. 11 kaj 12: A esperas ke B vidos sian patrinon; li esperas ke ili vidos sian patrinon.

#### 42. Kazo.

Kompreneble la 1-a formo estas korekta, la 2-a estas sensenca, kvankam gramatike ebla. En Jesaja 60/17 la senco estas: „Mi faros ke la paco estos via estraro kaj ke la justeco estos viaj administrantoj (t.e. ke paco kaj justeco regos)“. Senco iom nekutima, ŝajne, sed tuj komprenebla, kiam oni atentigas la kuntekston. Vidu ankaŭ respondon n-ro 41,6!

#### 43. -iĝ-.

Certe, „fumiĝadas“ ŝajnas unuamomente pli logika. Sed verŝajne la aŭtoro aŭ la tradukinto pli celis la eligadon de fumo ol la konsumiĝon. (Komparu: kamentuboj fumadas; ili povus „fumiĝi“ nur, se ili mem forbrulus.)

dono kaj estas ĝia eltiraĵo mem pro tio, ke la prestiĝoj en la raporto estas de la sama grandeco kiel en la Aldono kaj ke la nombro da paĝoj tute koincidas.)

375-3. ankaŭ alian aferon. Ĉiuj referencoj krom OV legas: ankoraŭ alian aferon.

375-23. la morto kaptis. R kaj LI personigis kaj komencis per majusklo „Morto“.

375-32/3. Javal ne plu ekzistas. Tiel legas OV kaj LI solaj, dum ĉiuj aliaj referencoj legas: Javal plu ne ekzistas. Rimarku la renverson de plu kaj ne. Zam neniam uzis la formon: ne plu (verbo); lia uzado estas ĉiam plu ne (verbo), ne ĉiam antaŭ verbo. La solaj esceptoj (nur duloke krom ĉi tie) troviĝas en liaj paroladoj (nenie aliloke!), kie mankas referencoj por kruckontroli kaj aŭtentikeco estas tre dubinda, t.e. OV 400-34 kaj 412-18, kies rimarkojn vidu.

376-36/7. nun ŝovas . . . nun halti. La vorto nun aperas ankaŭ en R, Ĉas kaj Brüg, dum ĝi tute mankas en ED kaj Möb.

377-17, kelktaga. Tiel legas R, Ĉas, Brüg kaj OV. Alia legado estas kelktaga laŭ ED kaj Möb. Komparu OV 543-27: kelktaga.

377-32. Jeruzalemo. Ĉiuj referencoj legas koincide kiel la formo donita. En ia 8 apartaj libroj de la Biblio eldonitaj de Hachette Zam uzas ĉi tiun formon, dum la Biblio de la Brita eldono ĉiam legas: Jeruzalemo. Komparu nian rimarkon OV 365-9 pri „Jozefo“ kaj ankaŭ Rabeno 11-20, 19-8: Jeruzalem.

377-40 kaj 378-4. la ideo . . . ia ideo. Por ambaŭ lokoj „ia ideo“ ŝajnas taŭga pro la kunteksto 377-38: certa . . . ideo.

377-40 (LI, OV) la ideo — (ĉiuj aliaj) ia ideo.

378-4 (LI sola) la ideo — (ĉiuj aliaj) ia ideo.

378-23. esperantistoj. Ĉi tie ĉiuj referencoj krom OV legas esperantujanoj, kiam la kunteksto favoras.

### 381. Parolado en la Guildhall de Londono 21 Aŭg. 1907.

OV ref: Aldono, LI, ED.

Niaj ref: Aldono, LI, ED, Ĉas, Möb, Brüg.

„Aldono“, kiu troviĝas en la Raporto de Corret kaj Era, pri la 3-a Kongreso, havas la saman tekston kiel en LI. La Raporto mem estas eltiraĵo el LI.)

381-25. Dover. LI sola donas esperantigitan „Dovero“.

382-5. kaj fiksis. ED, Ĉas, Möb, Brüg legas ĉi tiun verbon „fiksi“ kiel komplementon de „decidis“: decidis elekti . . . kaj labori . . . kaj fiksi. OV sekvis la legadon de LI, kiu plimfazis: fiksis. En LI tamen „fiksis“ aperas kiel senatenta prezeraro, dum OV ŝajnas peni pravigi, apartigante per komo post „decidis“ kaj „ĝi“. Komoj en ambaŭ lokoj mankas en LI. OV legas: ni decidis, elekti . . . kaj labori . . . por ĝi, kaj fiksis . . . levante „fiksis“ al la sama rango kiel „decidis“.

382-19. la vojo elektita. Tiel legas ED, Möb, Brüg kaj OV. La aliaj tekstoj LI kaj Ĉas legas: la vojo elektita. Ne estas neeble supozi, ke Zam uzis ĉi tie la duan formon, prenitan el la „Vojo“, kiu legas:

Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la vojo elektita.

Komparu la paralelan citaĵon p. 375-20 en la parolado farita ĉe la 3-a Kongreso de la sama jaro: Vivu la Reĝo al vi, tre longe vivu Li, gardu Lin Di!, kiu kompreneble estis prenita el la poemo, „Al la Reĝo“ (F. Krestomatio p. 329):

Vivu la reĝo al mi, tre longe vivu li!  
Gardu lin Di!

382-36. Herostratan. ED sola ellasis H kaj legas Erostratan. Herostratus (Herostratos, Erostratos), efesano, kiu bruligis templon pro vanta gloram. Komparu p. 562-38: kontraŭ ĉiuj herostratoj.

382-41. konsistas en malamo. Tiel donas LI, Ĉas kaj OV. Neĝuste legas „el“ anstataŭ „en“ ED, Möb kaj Brüg.

383-9. sovinstoj. LI kaj OV ne havas la artikolon la antaŭ ĉi tiu vorto, dum ĉiuj aliaj ĝin havas. La kunteksto favoras la uzon de la artikolo — 383-41: la gentaj sovinstoj; 384-9/10: demuoj reprezentantoj . . . tiuj mal-lumaj demuoj.

### 384. Kvara Kongreso 1908 en Dresden.

OV ref: LI, R, ED, Belga Esp.-isto, Finna Esp.-isto.

Niaj ref: LI, R, ED, Ĉas, Möb, Brüg.

(LI-a eltiraĵo estas eldonita en aparta broŝuro: Raporto pri la Kvara Kongreso de Corret kaj Era.)

384-16/7. honoran prezidantaron kaj. La tri vortoj mankas en LI kaj Möb.

384-37/9. nia Kvaro . . . kiu . . . kaj kiu, ED, Möb kaj OV legas kiu rigardante la Kvaron kiel unu korpon, dum R, LI, Ĉas, Brüg (duone) legas kiuj en ambaŭ lokoj. La dua grupo vidas en la Kvaro apartajn personojn konsistigantajn la komitaton.

386-25. la ekstera mondo, kiujn. R, LI, ED, Möb, Brüg kaj OV legas kiujn anstataŭ kiun: la ekstera mondo, kiujn la reformemuloj celis, restis indiferenta koncerne tion . . . Se „kiujn“ ne estas prezeraro, la vorto „mondo“ estas rigardata kiel eksteraj personoj, flankuloj. Malkonveno de ĉi tiu legado estas evidenta pro tio, ke en predikata parto estas uzata ĝia komplemento „indiferenta“ en ununombro. Ĉas sola legas kiun.

387-44. de nia afero ĉio povas esti atingita. „De nia afero“ troviĝanta en ED kaj OV ŝajnas trolimigi la sencon de „ĉio“. R, LI, Ĉas, Möb kaj Brüg legas adverbe: en nia afero.

### 389. Kvina Kongreso 1909 en Barcelona.

OV ref: OG, ED, LI, Belga Esp.-isto.

Niaj ref: OG, ED, LI, Ĉas, Möb, Brüg.

(La tekstoj de OG kaj ED estas tute identaj. LI donas mallongan resumon. La Raporto pri la 5-a Kongreso de Corret estis eldonita en aparta broŝuro, sed ni gajnas nenion novan pro ĝia identeco kun LI. Ni donas ĉi tie la resuman raporton de la Parolado, kiel aperas en LI XIV-a Jaro, (1909) p. 394, ĉar estas nun tre malfacile akiri la malnovan gazeton.)

D-ro Zamenhof stariĝas. Longa aplaŭdado lin salutas. Tiun ĉi jaron li ne legas, kiel ĝis nun, antaŭpreparitan paroladon, sed nur diras kelkajn salutajn vortojn: Ĉiun fojon, kiam disiĝas post kongreso la esperantistoj, ili kun antaŭa ĝojo diras unuj al la aliaj „Ĝis ia revido!“ kaj sopire ili dum la tuta jaro atendas la momenton, kiam ili povos denove premi al si reciproke la manon. Li kontraŭe ĉiam sin preparas por la kongreso kun peza koro, pro la honoroj, kiujn li devas akceptadi. Tiujn honorojn al li dediĉas la esperantistoj, ĉar bezonante ion konkretan, ili vidas en li la reprezentanton de sia komuna ideo. Li dezirus stari en antaŭ ili, sed inter ili, sed la afero ne dependas de li, kaj ankoraŭ hodiaŭ li staras antaŭ ili, kiel la simbolo de ilia unueco, ĝis la momento, kiam ili eble havos alian reprezentanton. Li esprimas la plej respektan dankon al Lia Moŝto la reĝo Alfonso XIII, kiu bonvolis akcepti la honoran prezidantecon de la Kongreso. Li esprimas ankaŭ dankon al la ministroj, kiuj akceptis esti ĝiaj altaj protektantoj; al la registaro, kiu invitis la aliajn registarojn oficiale sendi delegitojn; al la urbo Barcelono, kvankam eksteraj cirkonstancoj ĝin malhelpis montri sian entuziasmon; al la Komitato, kiu laboris por prepari la kongreson. En la ĝisnunaj Kongresoj li ĉiam havis iom gravan por diri kaj parolis longe. Hodiaŭ estas nenio grava, kaj li nur parolos mallonge. Dum la pasinta jaro ni prospere vivis, kreskis kaj fortiĝis en ĉiuj rilatoj. Al laborintoj koran dankon! Ni nun devas labori kaj konsiliĝi kune. El

la laboroj ni prenu forton por la laboro de la tuta venonta jaro! (Longa aplaŭdo).

391-33. Ni sane vivis, ni kreskis. OV sola legas „sane“ dum ĉiuj aliaj referencoj legas „same“. La resumaj raporto ne donas la saman esprimon, sed favoras la legadon de OV: Dum la pasinta jaro ni prospere vivis, kreskis . . . Komparu OV p. 407-20: ĝi tamen ĉion sane eltenis; p. 462-3: la esperanta afero vivu kaj progresu sane.

### 392. Parolado pri Universala Esperanto-Asocio en Barcelona 1909.

OV ref: Corret, LI, Esperanto.

Niaj ref: Corret, LI.

(Raporto de Corret estas tute identa kun LI, kies eltiraĵo ĝi estas.)

393-10. organizataj pro. LI (Corret) donas „organizitaj por“. Laŭ nia persona opinio estas preferinde diri „organizitaj pro“.

### 393. Sesa Kongreso 1910 en Washington.

OV ref: R, OG, ED, LI, Warden, Eho-Esp.-ista, Rund um die Welt.

Niaj ref: R, OG, ED, LI, Warden, Ĉas, Möb, Brüg.

(LI kaj Raporto de Warden legas tute idente kaj OG kaj ED estas de unu kaj sama prestiparo.)

394-31. nia afero estas ankoraŭ tro juna. LI sola legas tre juna. Komparu 400-16/7: Usono estas ankoraŭ tro juna en nia movado.

394-36/7. Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendos de ĝi? Tiel legas ĉiuj krom LI, kies legado estas: Kiaj estos la sekvoj? Kion ni atendas de ĝi?

396-30. morale tio estus nur peko. Anstataŭ peko, LI sola neĝuste legas krimo.

397-8. nek komencos. R, Ed, LI, Ĉas, Möb kaj Brüg legas: ne komencos. OV sola donas nek. Ni ne havas la du lastajn gazetojn donitajn en OV: Efo Esperantista kaj Rund um die Welt, kaj ne scias ĉu ili donas nek aŭ ne. Spite de tia dubinda aŭtentikeco, ni opinias ke OV-a legado estas rekomendinda: ĝi ne riskos preni . . . nek prenos . . . nek komencos . . .

397-36/7. tio estus ja simple infanaĵo. OV sola legas simple anstataŭ simpla, kiel legas ĉiuj aliaj. Ĝi ŝajne estas prezeraro de OV. Komparu OV 532-13: estis simpla malkompreniĝo; 540-14: estas ja simpla frenezajo.

397-43. tiajn vortojn aŭ formojn, kiuj, OV, LI, ED (OG), Ĉas, Brüg legas kiel supre, dum R, Möb donas tiujn anstataŭ tiajn. La formo „tia . . . kiu“ ne estas malofita en Zam, kaj larĝsenca „tiajn“ ŝajnas preferinda ĉi tie.

399-28. ĝia plej flama amiko. LI sola legas firma anstataŭ flama. La vorto flama troviĝas kun persona vorto en Batalo 53-32: flamaj patroj. Komparu ankaŭ Rabistoj 78-14. Fabeloj III 80-28.

### 400. Ferma Parolado en Washington 1910

(La Kritiko de ĉi tiu parolado aperos en sekvanta numero.)

### 401. Ruslanda Prepara Konferenco 1910.

OV ref: British Esp.-isto.

Nia ref: —

(OV ĉerpis sian tekston el The British Esp.-isto, kies fonto estas „Ondo de Esperanto“. LI (1915, p. 331/2) donas parte, nome de 401-14 ĝis 402-11. Ni ne havas apartan rimarkon por fari.)

## Tempaj rilatoj.

La demando metita en n-roj 8 kaj 9 de la Gramatikaj Demandoj en n-ro 2 de Lingva Kritiko, aperigas denove bedaŭrindan aferon en Esperantujo, nome, oftan konfuzon en tempaj rilatoj. Pro manko de (almenaŭ certaj) estantaj kaj estontaj participoj en la plimulto de hinda-eŭropaj lingvoj, ĉiuj tempaj ideoj devis esti kunpuŝitaj en unu formon, kaj ne nenature kvazaŭ aligiĝis al ĝi en la penso. Rezulto — en lingvo permesanta klaran kompletan tempan esprimon esperantistoj ofte ne scias, kion fari. Bedaŭrinde Zamenhof mem en la Lingvaj Respondoj enlasas elementon de interna konflikto. En la Fundamento kaj Fundamenta Krestomatio, ago komencita en la estinteco kaj daŭranta en la nuneco ĉiam estas esprimita per la estanta tempo. Ekz. „Mi estas ĉi tie kvar tagojn” ktp. — sufiĉe bona principo. Por konformi al tio, ordinare ni devus diri, simile, „Mi estas okupata la tutan matenon”, ktp. Sed tio ne plaĉis al Zamenhof, kaj kredinde la kialo lin subkonscie influanta estis la jena. Originale la perfekta tempo (tiam la aoristo) en la hinda-eŭropaj lingvoj tute ne signifas estintan tempon, sed plenumitan kondiĉon kiu ĝenerale etendis sin en la nunan tempon — la tiel nomata „durativa estanteco”. Nur poste kaj ne komplete en ĉiuj hinda-eŭropaj lingvoj, la ideo de la vera perfekta tempo

kiel esprimilo de la definitive estinta afero atingiĝis, kaj ŝajne Zamenhof estis iom influata de la malnova „durativa” ideo. Feliĉe en la F. K. kaj Fundamento sin trovas sufiĉe grandnombraj ekzemploj de vere logika kaj tial prava uzo de participoj, en kunmetitaj tempoj, kaj (eĉ pli ofte) sendepende de helpa verbo, por justigi konsekvencajn korektan elekton de la tempoj.

Estas rimarkinde, ke konstante, dum la tempo antaŭen iras, la pli spertaj esperantistoj pli kaj pli evitas tiajn formojn, kiel „estos savitaj” (sin trovanta en la Nova Testamento, kie la senco certe ne estas, ke je certa dato la personoj jam estos savitaj antaŭ ol okazos io alia; sed estas, ke en la estonteco ili estos savataj. Sendube la citita uzo devenas de certa formo de la estonta tempo de la pola verbo.)

Tre konsilinde estas, tamen, eĉ nun, ke lernanto ne pensu ke, ĉar la responda participo en lia nacia lingvo estas senrigarde al la logiko ĉiam pasinttempa, li devus uzi la saman tempon en Esperanto eĉ kiam ĝi ne konvenas al la situacio; kaj ke li estu avertata, ke estas multe pli bone ordinare uzi por ĉiuj agoj, komencitaj en la estinteco kaj daŭrigataj en la estanteco, unuforman elekton de la nuna tempo, se necese por precizeco kvalifikata de ia adverbo, ktp., montranta la daŭron de la ago.

J. E. Bauman.

## Refoje la „problemo” ata-ita.

En „Lingva Kritiko” n-ro 5 (junio 1932) mi estis jam detale klariginta la „problemon” ata-ita. Mi estis klopodinta klarigi ĉion per kiel eble plej simplaj ekzemploj kaj eviti fremdvortojn kaj sciencecan traktadon. Kaj mi estis pensinta, ke tiamaniere miaj klarigoj estas vere klaraj kaj konvinkaj kaj ne lasas plu dubon pri la logika aplikado de la malsimplaj tempoformoj pasivaj. Tamen mi estis erare opiniinta. Jes, estis venintaj voĉoj, kiuj estis aprobitaj miajn klarigojn kaj kiuj estis konsentitaj pri ilia logikeco; sed . . . sed . . . „ekzistas vidpunktoj” (estis skribinta iu) . . . kaj „ekzistas almaniera uzado” (estis skribinta alia), eĉ en „Fundamenta Krestomatio”, eĉ ĉe Zamenhof. Kaj la germanoj . . . la obstinaj germanoj . . . ili „ne komprenas la aferon”, kvankam, tamen, s-ro T. J. estis argumentinta ne per germanlingvaj ekzemploj sed nur logike, jes, „tre logike” (oni konsentas) li estis argumentinta, tamen . . . „dum multaj jaroj mi estis Lingva Komitatano” (do li devas pli bone scii — sendube!) . . . „la redaktoroj de Heroldo kaj speciale s-ro Teo Jung devas iom lerni Esperanton” (\*) (uf!) . . . kaj „estas honto por nia movado, ke redaktoroj de tiom gravaj gazetoj kaj gvidantoj de nia movado ne scias bone la lingvon” (\*) . . . mortbatu (batmortigu) ilin, la insistantojn pri korekteco (la ĉefredaktoron de Heroldo kaploke), kiuj argumentadas logike, kiuj estas pravaj, kaj kiujn tamen diablo prenu, ĉar ili detruas nian per 45-jara uzado sankciitan tradician aplikadon, kvankam nelogikan!

Sed ni estu seriozaj. Kara leganto, ĉu vin ne ŝokis en ĉi-supraj linioj la konstanta uzado de la is-inta-formo, anstataŭ la korekta

is-formo? Nu, simile ŝokas mian lingvan kaj logikan senton vidi is-ita-formojn, kiam la logiko postulas is-ata. Mi nomas tiujn formojn (is-ita, kiam la logiko postulas is-ata) ne nepre malkorektaj, ĉar ankaŭ Zamenhof ilin ofte uzis, ŝajne pro naciolingva kutimo, kaj ne estis nia intenco malpermesi ilian uzadon; sed kion ni volis, estas ke oni agnosku la logikecon kaj korektecon de la pasivaj formoj de l' verbo uzataj en Heroldo, kaj ke tiuj, kiuj povas logike pensi, sekvu la ekzemplon de nia redakcio kaj de tiuj „gvidantoj de nia movado” kiuj (laŭ „Bulgara Esperantisto”) „ne scias bone la lingvon”, — tiom pli, ke tiu ĉi logika uzado estas pli natura kaj pli simpla ol la sistemo aplikita de D-ro Zamenhof kaj defendata, ekz., de s-ro Waringhien en sia „Letero al Teo Jung” en la pasinta numero de „Lingva Kritiko”. La logiko postulas, ke la samaj participoj estu uzataj, egale ĉu oni rakontas ion en formo pasinteca, nuntempa aŭ estonteca. (Vidu la simplajn ekzemplojn, kiujn mi donis en mia artikolo en la juna numero de „Lingva Kritiko”!) S-ro Waringhien kvazaŭ riproĉas, ke mi montris ekzemplojn elpensitajn. Nu, la tuta literaturo Esperanta ne prezentas tiel simplajn kaj trafajn ekzemplojn kaj, fine, ĉu elpensitaj ekzemploj ne estas same pruvkapablaj kiel tiaj serĉitaj el libroj? Kial malsimpligi al si la taskon, kaj al la legantoj la komprenon? Same estas pri aoristo kaj klarigoj per latina aŭ per naciaj lingvoj. Mi intence evitis en mia artikolo alian lingvon krom Esperanto, intence mi evitis paroli pri prezenso, preterito, imperfekto, aoristo, perfekto, pluskvamperfekto kaj futuro. Mi volis pruvigi per simpla logiko kaj tiel, ke eĉ leganto en speciale instruitaj ĝim komprenu. Aoriston Esperanto ne konas. Ankaŭ la latina lingvo ja ne havas specialan aoriston.

Tial mi supozas, ke s-ro W. uzas tiun terminon nur por signifi la „rakontan formon”. Nu, la rakonta formo en Esperanto ĝenerale estas la simpla pasinteco (imperfekto, sed ne la pluskvamperfekto), kaj kelkfoje la nuntempo (prezenso). Kaj tiu formo aplikigas sammaniere al ĉiuj verboj, egale ĉu tiujn verbojn oni nomas „verboj de daŭro”, „verboj de daŭro kaj rezulto” aŭ „verboj de rezulto”. Cetere, jen ankaŭ s-ro W. erarigas sin mem per la vorto „daŭro”. Mi ripetis (el mia antaŭa artikolo): „Ata signifas samtempecon (daŭron de la ago) rilate al la momento, pri kiu oni parolas.” Kial „perdi, forgesi, elpensi” ne povas esti samtempaj al io alia, aŭ eĉ daŭri? Dum tuta horo oni povas perdis akvon el fenhava vazo, dum mia tuta vivo mi forgesadas negravajn momentojn, dum jarmiloj la homaro elpensadas ĉiam novajn loĝojn por reciproka mortigado.

En la rakontataj okazaĵoj iras kontinue; oni ne povas, logike, subite interrompi la imperfekton per pluskvamperfekto: „La karavano alvenis. Tiam la portistoj demetis siajn ŝarĝojn. La karavano iris en la domon . . .” Nelogike estus, rakonti: „La karavano alvenis. Tiam la portistoj estis demetitaj siajn ŝarĝojn. La karavano estis . . . en la domon . . .” Sed paŝon post paŝo la rakonto iras. Tute same en pasivo: „La karavano alvenis. Tiam la ŝarĝoj estis demetitaj. La karavano estis kondukata en la domon . . .” Logike oni ne povas rakonti: „La karavano alvenis. Tiam la ŝarĝoj estis demetitaj. La karavano estis kondukita en la domon . . .” (Tio signifus, ke la ŝarĝoj estis jam demetitaj, kiam la karavano alvenis, kaj tio ja ne havus sencen.)

Alia ekzemplo: „La fianĉino estis en la ĉambro. Tie ŝi estis vestata de siaj amikinoj. Kiam ŝi eniris la salonon, ŝi estis vestita per rava robo . . .” En la dua frazo is-ata estas la sola logika formo, sed en la lasta frazo logika estas is-ita, ĉar la vestado estis antaŭtempa al la eniro en la salonon.

La lasta ekzemplo, se rakontata en prezenso, tekstus jene: „La fianĉino estas en sia ĉambro. Tie ŝi estas vestata de siaj amikinoj. Kiam ŝi eniras la salonon, ŝi estas vestita per rava robo . . .”

Se iu verkisto intencas skribi romanon, en kiu li volas rakonti supre cititan okazaĵon, li pripensas jene: „La fianĉino estos en sia ĉambro. Tie ŝi estos vestata de siaj amikinoj. Kiam ŝi eniros la salonon, ŝi estos vestita per rava robo . . .”

Oni rimarkas la absolutan harmonion en ĉiuj tri tempoformoj (preterito, prezenso kaj futuro). Ĝenerale oni povas do apliki la jenan regulon:

Se en prezenso staras ata, ĝi devas ankaŭ stari ĉe la koresponda verboformo preterita aŭ futura; se en prezenso staras ita, ankaŭ en preterito kaj futuro staras ita:

ĝi estas vestata,  
ĝi estis vestata,  
ĝi estos vestata;  
sed:  
ĝi estas vestita,  
ĝi estis vestita,  
ĝi estos vestita.

Tiu regulo estas logika, simpla, ne miskomprenbla kaj facile memorebla de ĉiu. Plej ofte jam la lingva sento (se ne misgvidata de naciaj lingvoj) indikas la

\*) La redakcio de „Bulgara Esperantisto” en numero 9-10, p. 15.

ĝustan formon. Ankaŭ Kalocsay en „Lingvo, Stilo, Formo“ (paĝo 84) ne per logiko, sed per sia lingva sento trovas la ĝustan formon; sed li komparas nur as-ita kaj is-ata, kaj pri is-ita li ne parolas.

Se De Beaufront, Aymonier, Fruictier, Stamatidis (laŭ la aserto de s-ro W.) kaj multaj aliaj same traktis la demandon kiel mi, ĉu tio ne estas pripensinda fenomeno? Estas vero — mi ripetas —, ke Zamenhof ofte uzis is-ita, kiam la logiko postulas is-ata. Tamen ŝajnas, ke dum lia vivtempo neniu sentis la nelogikecon aŭ ne atentis ĝin. Alie certe troviĝus koncerna paragrafo en liaj „Lingvaj Respondoj“. Entute, la malsimplaj pasivaj formoj estas en la literaturo ne tre oftaj kaj, cetere, ĉiu uzis je okazo tiun formon, kiun li opiniis korekta, kaj estis bone komprenata de ĉiu esperantisto en la tuta mondo. Generale, por la kompreno de iu teksto ne estas grave, ĉu en ĝi troviĝas is-ata aŭ is-ita. Kaj ofte la is-ita-formo estas pravigebla apud la is-ata-formo, t. e. en multaj kazoj ambaŭ formoj estas pravigeblaj, eĉ logikaj. Do, oni tute ne bezonus perdati tiom da klopodado kaj loko por tiu ĉi „problemo“; la „ŝtono ekruĝigis“ nur, kiam nia redakcio „korektis“ en iu teksto kelkajn is-ita-formojn per plii logikaj is-ata-formoj, pri kio la aŭsendintoj ne konsentis sed publike plendis. Aliflanke ne povas malutili, ke la is-ita-demando estas iom detale pritraktita kaj, mi esperas, pliklarigita ol ĝi estis antaŭe.

Resume: Kies precize logikan pensadon aŭ sentadon en tiu ĉi demando malfaciligas nacilingva kutimo, tiu uzu en estonteco, kiel ĝis nun, la is-ita-formojn ankaŭ tiam, kiam la logiko postulas is-ata; li povas sin pravigi per tio, ke ankaŭ Zamenhof ofte malatentis la logikon en tiu ĉi punkto. Sed kiu scipovas logike apliki la malsimplajn pasivajn formojn, al kiu la uzado de la nelogikaj formoj eble eĉ ŝajnas komplika malfaciligigo aŭ al kies logika sento ĝi donus kvazaŭ baton en la vizaĝon, al tiu oni nepre ne malpermesu la aplikadon de la logikaj formoj.

Interese estus, pri tiu ĉi afero aŭdi la opinion de orientano, ekz. japano, plej bone de tia, kiu scias nenian lingvon krom sia gepatra kaj Esperanto. Oni povas supozi, ke la logika pensado de tia orientano estas malpleje influata.

T. J.

## Pri „ata-ita“.

Ŝajnas al mi, ke s-ro T. J. estas ĝenerale prava pri la signifo de -ata kaj -ita, sed li evitas la ĉefan demandon.

En sia propra lingvo la germanoj ĉiam amas la estantan tempon ĉe verboj, ĉar, por germanaj oreloj, ĝi ŝajnas pli viva. Kiam s-ro T. J. skribis, „La pordo estas malfermata“, verŝajne li kvazaŭ vidis la moviĝon de la pordo, kaj tio interesis lin. Sed ĝi ne interesas min: mi volas, ke la pordo estu malfermita por ke la enironta sinjoro povu trapasi.

Simile, se s-ro T. J. skribas, ke s-ro N. estis akceptata de la urbestro, verŝajne li kvazaŭ vidas la mezon de la akceptado, kiam la urbestro premas la manon, kaj ekparolas kun s-ro N., kaj tio plaĉas al s-ro T. J. Tamen, la vortoj, „s-ro N. estis akceptata...“ neniel signifas, ke la akceptado kompletigis, — eble io interrompis ĝin, — kaj malkompletaĵoj ne plaĉas al mi; mi volas sciigi, ke s-ro N. estis akceptita.

La uzo de -ata en „Heroldo“ ofte ŝokas negermanojn, ne pro analogikeco, sed pro tio, ke ĝi ne prezentas okazintaĵojn laŭ internacia vidpunkto.

W. W. Padfield.

# Abelkultura terminaro.

De Karlo Gerber,

Limbach, poŝto Burgau (bayr. Schwaben), Germanlando.

## La bestoj:

**abelo.**  
**abelido** — junabelo, ne jam elfluganta;  
**laborabelo, laboristino;**  
**virabelo;**  
**virabelaĉo** — virabelo, maskita de laborabelo dum la senabelineco de abelaro;  
**abelino** — patrino de abelaro, abelreĝino;  
**abelinido** — junabelino, ne jam koitinta<sup>1)</sup>;  
**abelinaĉo** — laborabelo, naskanta virabelovojn dum la senabelineco de abelaro;  
**abelaro** — abelpopolo, abelkolonio;  
**abelarano** — unuopa besto de abelaro;  
**svarmo** — svarmanta aŭ svarminta parto de abelaro kun abelino;  
**postsvarmo** — svarmo, aperanta 7 ĝis 9 tagojn post la svarmo kun unu aŭ kelkaj abelinidoj;  
**abelarido** — abelaro, konsistanta el abeloj, debalantaj de okupitaj ĉelaroj, kaj abelino;  
**kovarido** — abelaro, konsistanta el kovoĉelaroj kun sursidantaj abeloj kaj abelino (aŭ abelinĉelo).

## La kulturisto:

**abelisto** — abelkulturisto, abelbredisto;  
**abelinisto** — abelinbredisto.

## La kovajo:

**abelovo** — ina abelovo, spermumita<sup>2)</sup>;  
**virabelovo** — vira abelovo, nespermumita;  
**larvo** — rondlarvo;  
**nimfo** — etendita larvo;  
**rupo.**

## La vakskonstruajo:

**laborabela ĉelo;**  
**virabela ĉelo;**  
**abelinĉelo** — glanforma ĉelo, en kiu la abelinido evoluas;  
**ĉelaro;**  
**kovoĉelaro** — ĉelaro kun kovajo;  
**mielĉelaro** — ĉelaro kun mielo;  
**vaksplato** — gisita aŭ rulpremita plato el vakso kun ĉelformoj, kiun la abeloj finkonstruas je ĉelaro.

## La abela loĝejo:

**abelujo** — loĝejo de abelaro;  
**kovujo** — ujo, en kiu la abeloj flegas la kovajon;  
**mielujo** — ujo super la kovujo, kies ĉelarojn la abeloj dum la somero plenigas per mielo;  
**fundo** — fundtabulo kun flugtruo, sub la kovujo;  
**kovrilo** — tabulo sur la kovujo aŭ mielujo;  
**tegmento** — sur la abelujo;  
**pajlokorb** — abelujo, plektita el pajlo;  
**ŝtipabelujo** — abelujo el kavigita arbotrunkero;  
**flugtruo** — trairejo fronte de la abelujo;  
**flugtabulo** — tabuleto pendiginta antaŭ la flugtruo;  
**nutrilo** — trogo aŭ botelo por nutrado de la abeloj;  
**kadro;**  
**duonkadro** — duonalta kadro en la mielujo;  
**dika kadro** — 4 cm dika duonalta kadro en la mielujo;  
**sekcio** — kadreto en la mielujo;

**distancigilo** — fera arketo aŭ kapnajlo ĉe la kadro ebliganta, ke la abeloj povas iri inter la ĉelaroj kaj inter kadroj kaj abelujaj vandoj;  
**esceptilo** — krada barilo, malhelpanta la abelinon, iri el la kovujo en la mielujon;  
**eskapilo** — lada ilo kun klapetoj aŭ risortoj, tra kiu la abeloj antaŭ la mielrikolto iras el la mielujo en la kovujon, sed kiu baras la vojon returne;  
**abelinujo** — abelujeto kun unu aŭ du ĉelaroj kaj abeloj, el kiu la abelinido elfugas al la koito;  
**abelin(bred)ejo** — ĝardeno kelkajn kilometrojn for de ĉiuj abelujetoj de la ĉirkaŭaĵo, en kiu staras unu abelujo kun selektita abelaro, kies virabeloj koitas kun la abelinidoj el la abelinujoj;  
**abelejo** — ligna dometo, en kiu staras la abelujoj, uzata en Germanlando.

## Kulturiloj:

**vualo** — travidebla vualo, kiu ŝirmas la abeliston kontraŭ atakoj de la abeloj;  
**fumilo** — fulmblovilo;  
**abelinkaĝo** — krada kaĝo, kiu kontraŭ atakoj de la abeloj ŝirmas la fremdan abelinon aldonotan;  
**(vaksplato-)gisilo** — pelvo kaj plato el metalo kun ĉelformoj, inter kiuj la vaksplatoj estas modlataj;  
**(vaksplato-)rulpremito** — du metalĉiĉindroj kun ĉelformoj sur la surface, inter kiuj la vaksplato estas modlata per rulpremadaj;  
**vaks-ekstraktilo** — kaldrono kun truhava enmetaĵo kaj premilo, en kiu per vaporo la ĉelaroj estas disfandataj kaj la pura vakso gajnata;  
**miel-ekstraktilo** — dratkorbo en kaldrono, en kiun estas starigataj la mielĉelaroj kaj kiun la abelisto rapide turnas, por ke la mielo estu elĵetata el la ĉeloj;  
**mielglasoj;**  
**miebareloj;**  
**ĉel-malkovrilo** — larĝa fonko aŭ tranĉilo, per kiu oni forigas la ĉelkovrilojn de la mielĉelaroj antaŭ la mielekstraktado;  
**miefiltrilo** — krado, tra kiu la mielo fluas kaj puriĝas;  
**miekkupelilo** — kaldrono por la kupelado de la mielo;  
**miekspatelo** — spatelo, per kiu oni elfosas la malmolan mielon;  
**kadro-truigilo** — aparato, per kiu oni tra la kadro pikas truetojn, tra kiuj la ĉelardrato estas tirata;  
**ĉelardrato** — metalfadeno, kiu estas enfandata en la vaksplaton, por teni ĝin;  
**drat-enfandiĵo** — radeto el metalo kun dentoj kaj kanaletoj ĉe tenilo, kiun oni varmigigas, por enfandi la ĉelardraton en la vaksplaton;  
**elektra dratenfandiĵo** — per elektra varmo estas la ĉelardrato varmigata, tiel ke ĝi eniĝas la vaksplaton;  
**rultranĉilo** — tranĉa radeto ĉe tenilo, per kiu oni tranĉas vaksplatojn;  
**kadro-levilo** — du krucmetitaj ferarkoj, per kiuj oni levas la ĉelaron el la abelujo;  
**barilo antaŭ la flugtruo** — lada barilo, kiu malgrandigas la flugtruon.

(Finota.)

<sup>1)</sup> Koito = pariĝo, sekskunigo inter abelinido kaj virabelo

<sup>2)</sup> Spermumita = la abelino aldonas spermumon al ovo traĝiganta tra sia vagino.